Johann Friedrich Hahn,

Deziro

tradukita de N. N. 56

Dum promeno
Je mateno
Ĝojis mia koro:
Mute, el ĝardeno
Min salutis floro.

Do, mi restis,
Ĉar mi estis
Plena je admiro.
Tamen tuj ekestis
En la kor' deziro.

Flor' beleta,
Ĝojopreta
Kreitaĵo Dia,
Jen dezir' sekreta :
Floro, estu mia!

Traduko de la Germana poemo "Wunsch" de Johann Friedrich Hahn *(∗1753-12-28 – †1779-05-30) en Esperanton de N. N. 56.*

Arg-820-1645 (2013-02-06 15:02:46)

Tiu ĉi poemo aperis - laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann - en la jaro 1948 en la Esperanta revuo Heroldo. S-ano Kromann ne estis tute certa, ĉu la verkinto de la originalo vere estis la germana poeto Johann Friedrich Hahn, kiu vivis de 1753 ĝis 1779.

Johann Friedrich Hahn,

Wunsch

.....
.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....
.....

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Johann Friedrich Hahn *(∗1753-12-28 – †1779-05-30).*

Arg-820-1644 (2013-02-06 12:22:13)

Pri la poeto vidu la retejojn `http://www.enzyklo.de/Begriff/JohannFriedrichHahn` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Friedrich_Hahn`.